

N. N. 32,
Rozbranĉo
forĝermadis

tradukita de Felix Ney

Rozbranĉo
forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floret'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
Ĝi mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj
mort'.

...

N. N. 32,
Burĝonis roz-
zarbedo

tradukita de Guido Holz

1. Burĝonis roz-
arbedo
el delikata sin'
laŭ olda kant-
heredo,
Jiŝaj la origin';
ekĝermis ĉarma flor'
dum frosta vintro-
tempo
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,
mirinda roz-arbed',
elvenis flor' benata
laŭ diro de profet'.
Laŭ sankta Di-
ordon'
ŝi naskis infaneton
por nia sav' kaj
bon'.

3. Kaj ĉi floreto be-
las,
amindas per par-
fum';
la nokton ĝi forpelas
per sia brila lum',
nin helpas el mizer',
el pek' kaj morto sa-
vas;
Li, hom' kaj Di' en
ver'.

...

N. N. 32,
A spotless roze is
growing

tradukita de N. N. 33

1. A Spotless Rose is growing,
Sprung from a tender root,
Of ancient seers' foreshowing,
Of Jesse promised fruit;
Its fairest bud unfolds to light
Amid the cold, cold winter,
And in the dark midnight.

2. The Rose which I am sin-
ging,
Whereof Isaiah said,
Is from its sweet root sprin-
ging
In Mary, purest Maid;
Through God's great love
and might
The Blessed Babe she bare us
In a cold, cold winter's night.

...

N. N. 32,
Jen ĉiamviva
Rozo

tradukita de Leland Bryant Ross

Jen ĉiamviva Ro-
zo
laŭ vorto de pro-
fet'
El la Jiŝaja ŝoso
ekkreskis kun im-
pet'.
Ĝi venis, hela
Flor',
en frida tempo
vintra
Je noktomeza
hor'.

Jesaja ĝin anon-
cis,
la menciita Flor';
Maria ĝin respon-
sis
el patrin-ama
kor'.
Ŝi naskis Rozon
por
klarigi Dian amon
Je noktomeza
hor'.

Ĉi tiu milda Floro
per sia dolĉ-arom'
Heligas per Diglo-
ro
la vojon de la
hom'.
Ja homo, tamen
Di',
ĝi ŝarĝojn malpe-
zigas
Kaj homojn savas
ĝi.

...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Anglan de N. N. 33.

Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebookpaĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.